

NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Atocha 98-4º, 28012 Madrid

☎ lunde vespere (91) 530 87 98

Redaktas kaj tiras Lupe Sanz

JULIO-AUGUSTO 1995

ESPERANTO ĈE EŬROPA KOMUNUMO (DOCE n-ro C 145/54 95-06-12)

PREGUNTA ESCRITA E-647/95

de Eryl McNally (PSE)

a la Comisión

(9 de marzo de 1995)

(95/C 145/103)

Asunto: Utilización del esperanto

¿Ha estudiado la Comisión la posibilidad de que el esperanto se enseñe en todas las escuelas junto con otros idiomas y se utilice en un contexto más amplio en el conjunto de la Comunidad Europea?

Respuesta del Sr. Cresson
en nombre de la Comisión

(23 de marzo de 1995)

En aplicación del artículo 126 del tratado CE, el contenido de los estudios y la organización de los sistemas de enseñanza, incluido el tema de las lenguas, son responsabilidad de los Estados miembros.

Así pues, corresponde en primer lugar a los Estados miembros determinar las lenguas que se impartirán en sus respectivos sistemas de enseñanza. La acción de la Comunidad en este ámbito se limita a desarrollar el aprendizaje y la difusión de las «lenguas de los Estados miembros».

La diversidad cultural y lingüística es una de las grandes riquezas de Europa. Asimismo, la Comisión otorga una gran importancia a la promoción del pluralismo lingüístico, y actuó en este sentido en el marco del programa Lingua, que tiene por objeto la promoción de la enseñanza y el aprendizaje de lenguas. Continuará haciéndolo en el marco del programa Sócrates, que recoge y amplía las actividades del programa Lingua.

La Comisión considera que la utilización de una lengua neutra podría provocar una pérdida de tradiciones e identidad. Una lengua neutra no podría poseer toda la riqueza cultural e histórica de las lenguas naturales. La Comisión no tiene la intención de emprender iniciativas en favor de la enseñanza del esperanto.

estas premiita kun sterea muzik-ĉeno. Nia kara majstro estas nomita speciala kliento de firmao pri poŝta-vendado. Malfeliĉe la donaco estas persona kaj ne povas transdoni al iu.

EKDE JULIO, Augusto Casquero kaj lia familio, logos en Valencio, BV ne sendu leterojn al Slovakio.

HISPANIO

En unuhora televid-programo pri lingvoj de la **Barcelona** kanalo TV2, satelite kovranta parton de Europo kaj Sud-Ameriko, pri Esperanto parolis Llibert Puig, ĝenerala sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio, kaj la gejunuloj Pere Bernús kaj Rina Amerio. ("Esperanto" 5/95)

Antonio Alonso Núñez intencas realigi, dum somero 1995, ĉe Universitato de **Santiago de Compostela**, du antaŭ-universitatajn kursojn (unu-du semajnoj), en esperanto. La sukceso dependas de la apogo de E-asocioj kaj oficialaj instancoj al financado de vojaĝo kaj restado de junaj partoprenantoj

HEF ANGULO (Ne oficiale)

La stoko de la esperanta "Lexicón Sopena" estis acetita de S-ro Galofré, vic-prezidanto de HEF (ĉu pesone aŭ HEFe?). La kontisto de Centra Oficejo de Madrido ne havas fakturon de la elspezo kaj HEF-libroservo petis al MEL kelkajn eksemplerojn de tiu-ĉi libro. Kiu komprenas tion?

ESPERANTO ELEKTRONIKE

Elektronika versio de la kurso "Gerda malaperis" de Claude Piron povas esti lernata pere de Internet: derk@saluton.hacktic.nl ("Eventoj" marto 95)

HEROLDO

En sia 73-jara vivo eldonis ĉirkaŭ 100 esperanto-librojn kun pli ol 20.000 paĝoj entute. Famaj fariĝis ĝiaj modernaj lernolibroj, plurfoje reeldonitaj en esperanto, angla, hispana, franca kaj itala lingvoj: german-lingva lernolibro estas en preparo: Peranto en Hispanio: Luis Serrano Pérez

ZAMNEHOF PREMIITA

Ĉe MEL atingis reklam-letero je la nomo de *Luis Lazar Zamenhof Esperanto*, li

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

Ĉe la teraso de kafejo de Parque del Retiro dekstre, apud la enirejo "Puerta de Alcalá", okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredojn de ĉiu monato. Kutime gvidas ĝin Ana Manero.

DUM AŬGUSTO, LA PLEJ PARTO DE MADRIDAJ ESPERANTISTOJ KUTIME FERIAS, PRO TIO NE OKAZOS NORMALAJ PROGRAMOJ

UNESCO SUBVENCIAJ E-ON

"Esperanto" Radikala Asocio ricevis de UNESCO 10.000 \$ kiel subtenon al FUNDAPAX-projekto por instruado de Esperanto kunpropedeŭtika celo en elementaj lernejoj de pluraj landoj. ("L'esperanto" 26/2)

ESPERANTA TRADUKRETO

Post longa klopodado aperis internacia tradukreto pere de Esperanto, per ĝi estas atingeblaj 20 lingvoj fare de 31 tradukistoj. La reto celas pagatan tradukadon, kvankam senpaga laboro estas ebla al kelkaj kulturaj kaj homamaj societoj. Pli da informoj: Daniel Durand. Les Nids, F-49190 Saint Aubin de Luigne.

Francio. Fakso: +33 41 78 47 75 ("Internacia fervojisto 1/95")

FELICAN SOMERONiiiiiii

Pri E-projektoj ĉe Unesko

Mark Fettes, ĝenerala sekretario de UEA, vizitis la Parizan sidajn de Unesko la 31-an de marto, por starigi senperan rilaton kun ties respondeculoj pri lingvoinstruado, preparante la grundon por konkretaj proponoj esperantistaj.

Fettes renkontis la asistan ĝeneralan direktoron de Unesko pri edukado, Colin Power, kaj la kunordiganton de la lingvoinstruaj projektoj de Unesko, Joseph Poth.

Power kaj Fettes preparolis la kunlaborajn rilatojn de Unesko kun UEA. Tia interkonsento koncernis la partoprenon de UEA en Linguapax, programo celanta fortigi la ligojn inter lingvoinstruado kaj eduko je internacia amikeco, kiun lastatempe vigligas precipe katalunoj kaj aŭstralianoj. Tial Fettes letere petis Katalunan kaj Aŭstralian E-Asociojn kontakti la koncernajn instancojn pri kunlaboro.

Krome ili pritraktis jenajn eblajn projektojn:

- Plumbanda eksperimento pri E-instruado, kiu enplektu ne nur lernejojn sed ankaŭ esplor-institutojn pri edukado. Tia projekton preparas Hans Erasmus kaj Michael Cwik kadre de sia eŭropa agado. Ili planas peti subvencion de Sokrates, eduka programo de EU, kaj nun klopodas kontakti kunlaborantojn

en Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio kaj Nederlando. Tia projekto, serioze preparitan, Unesko preskaŭ certe subtenus — ankaŭ finance.

- Internacia konferenco pri E-instruado, kun serioza klopodo venigi ankaŭ nemovadanojn. Tio povus esti preparkonferenco por la eksperimento, aŭ io tute sendependa. Laŭ Zlatko Tišljar, kiu okupiĝas pri la projekto, la slovena registaro donus sian apogon. Ankaŭ Unesko ĝin subtenos post konkretiĝo de la planoj, se ĝin klare apogos unu aŭ pli da ŝtatoj.
- Starigo de reto de universitataj katedroj pri Esperanto, interlingvistiko kaj internacia lingva komunikado. (Ĉi tio estas ero en laborplano diskutota de eŭropaj landaj asocioj en la 2-a Esperanto Eŭrop-Unia Kongreso, okazonta en Parizo inter la 2-a kaj 6-a de junio.) Tia reto certe bezonos plurajn jarojn por elkreski, sed indas teni la ideon viva ĉe Unesko. ★

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4°

28012 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal

VAMPIRETOJ KAJ PARAZITOJ

Fernando de DIEGO

Dediĉo: Al S-ro Aleksander Korjenkov, Ĉefredaktoro de La Ondo de Esperanto, Eldonisto de la serio Sezonoj en Jekaterinburg, Ruslando.

Sekve de kelkaj personaj spertoj, kiujn mi travivis en la lastaj tempoj, mi sciivilis pri tio, ke la ne multaj sociologiaj esploroj entreprenitaj ĝis nun pri diversaj karakterizaĵoj de la esperanta komunumo limigis sin al la klasifiko de ĝiaj aĝo-grupoj, de ĝiaj soci-ekonomiaj niveloj, de ĝiaj ŝtupoj de edukiteco kaj de similaj aferoj.

Strange, ke oni ne havis la ideon fari studojn pri la negativaj aspektoj de nia kolektivo. Kiam mi diras "negativaj", mi ne aludas la rilatojn inter la esperantistoj kaj esperanto, nome ilian pli malpli grandan posedon de la lingvo aŭ ilian pli malpli grandan fervoron en la esperanta agado. Mi parolas pri la diversaj tavoloj de etika konduto troveblaj en nia verda mondo. Supozeble, oni ne entreprenis ĝi-tipan esploron ĉar la granda dozo da idealismo implicita en la celoj de la movado probable inspiras la ideon, ke sur tia grundo ne eblas la florado de nehonestaj kondutoj. Sed tamen...

Sufiĉas koni nur iomete la homan naturon por kompreni, ke alt-flugaj idealoj ne generas ekskluzive senmakulajn idealistojn. Vere, dum idealisma organizaĵo estas, pro sia propra esenco, senpova, senmona kaj senprestiĝa, ĝiaj membroj montras ĝenerale enviindan moralan forton kaj senriproĉan konduton.

Tio okazas grand-parte en nia movado ĉefe pro tio, ke en medio senpova, senmona kaj senprestiĝa trovas nenion predindan la grandaj friponoj, la senskrupulaj banditoj, la senmoralaj karlistoj. Sed kie mankas ŝarkoj, tie ne malestas vampiretoj kaj parazitoj. Kaj tia faŭno, posedanta pokajn aspirilojn kaj eĉ ne joton da memestimo, ŝajne konsistigas la solan makulon sur la korpo de la esperantistaj organizaĵoj.

Kiom granda estas la makulo? Ne tre, sed ĝi kaŭzas iriton kaj ĝenon kiel pikoĵ de moskitoj. Vampiretoj kaj parazitoj kontentiĝas per tio malmulta, kiun ili povas suĉi helpe de taktiko bazita sur kamuflado de sentoj kaj intencoj.

"Venezuela Stelo" N-ro 57. Marto 1995

Kaj ĉe la fino, post la piko, la cinikeco de ilia konduto estas grandioza kaj preskaŭ admirinda.

Vampireto kaj parazito estas la samideano. Kiu esprimas sian deziron interletieri kun alilandanoj, sed tute ne estas en sia intenco respondi al iu ajn, ĉar nur la postmarkoj de la korespondaĵoj interesas lin.

Vampireto kaj parazito estas la samideano, eble eĉ delegito de UEA, kiu ricevas servo-peton kun la respektiva kupono, prenas por si la kuponon kaj, kompreneble, ne ĝenas sin respondi al la bonfida petinto.


Vampireto kaj parazito estas la samideano, ne malofte el Orienta Eŭropo, kiu cirkuler-maniere petas monon por helpo al ege malsana infaneto, ĝis evidentigas, ke la infaneto estas produkto de lia fantazio kaj de lia avido havigi al si iom da valoraj devizoj.

Vampireto kaj parazito estas la samideano, kiu lerte ekspluatante la sentojn de esperantisma frateco de eksterlanda esperantisto, sukcesas ricevi de li gastiginviton, manĝas kaj trinkas ĉe li pagante eĉ ne unu groŝon, revenas al sia lando kaj ne havas eĉ la minimuman decon sendi al sia gastiginto du-linian dankon sur modesta poŝtkarto.

Vampireto kaj parazito estas la samideano. Kiu komencas eldonan karieron, kontaktas kun aŭtoroj originalaj aŭ/kaj tradukaj kaj pere de inteligenta korespondado elruzas el la aŭtoroj iun aŭ alian manuskripton, eldonas ĝin kaj en tiu momento ĉesas ĝia vivo-signo de li, ĝis la bon-intenca dupo, kiu cedis tute senpage sian laboron, komprenas ke li ne ricevos unu solan ekzempleron, el kiuj li rajtas kiel aŭtoro aŭ tradukisto.

La plej kurioza aspekto de ĉi divers-forma friponetado kuŝas en tio, ke la vampiretoj kaj parazitoj, ofte kleraj kaj ne senmonaj, evidentigas nekompreniblan mankon de memestimo kaj ian aberacian ŝaton al mizeraj profitoj je la risiko de absoluta senprestiĝigo. Sed, kiel diris Zamenhof, "ĉi fremda animo estas abismo sen limo."

Ja, vampiretoj kaj parazitoj ne abundas en nia Movado. Sed la ĝenerala koruptado, multe pli intensa de post la renverso de la soveta potenco, efiku ĉe ni kiel alarmo-signaloj; kaj por komenco ni devus publike denunci la kulpanojn de ĉiu etika translimigo. Eble la pilorio ne korektos ilin, sed, almenaŭ ilian nomon ni konos.



Pli proksimen al la ĉiutaga vivo!

Kvankam en pli ol cent jaroj Esperanto atingis grandan sukceson, la tago en kiu plejparto de la homoj parolos ĝin kiel komunan lingvon estas ankoraŭ tre malproksima. Kiel fari por progresi pli rapide kaj grandpaŝe? Surbaze de mia propra esperantista kariero kaj sperto, mi prezentos kelkajn proponojn.

1. *Emfazi la utiligon de Esperanto.*

En la komenco de la dua jarcento de Esperanto, UEA anoncis tri ĉefajn laborojn: disvastigo, utiligo, edukado (al tutmonda konscio). Mi aprobas tiujn tri celojn, sed mi opinias ke la utiligo devas okupi la unuan lokon: ni ja disvastigas Esperanton kaj edukas por utiligi ĝin.

Ke Esperanto indas la subtenon de la progresanta homaro, estas tute klare por esperantistoj. Ankaŭ multaj aliaj komprenas tion. Kial ili tamen ne volas propagandi kaj uzi Esperanton? Ĉar por ili ĝi ne estas utila, necesa en la ĉiutaga vivo.

En multaj kunvenoj ni vidas plejparte maljunulojn aŭ pensiulojn. Por ili Esperanto estas ilo por amikiĝi, sin distri. Tiuj aktivadas kiuj estas liberaj, ne okupitaj de laboro, sen vivzorgo — aliokaze, oni ne venas al la Esperanto-rondo.

Antaŭ kelkaj jaroj en Ĉinio 20-30 mil junuloj serioze kaj fervore lernis Esperanton. Hodiaŭ kie ili estas? Kion ili lernas? Ili forlasis Esperantujon kaj eklernis la anglan, japanan aŭ korean. Kial? Ĉar tiuj lingvoj estas pli utilaj, pli gajnigaj en la komerco ol Esperanto! La vortoj *Coca Cola*, *Philips*, *Sony* estas pli konataj ol *Esperanto*.

Por Esperanto plej gravas la praktiko en sciencoj kaj teknikoj, en la internacia komerco. Eĉ, la uzado de Esperanto en tiuj kampoj decidus pri ĝia estonteco.

2. *UEA starigu ekonomian korporacion por garantii la financon de la E-movado.*

Multaj fidele kaj dankinde helpas al UEA kaj aliaj E-organizoj.

Tamen, sen firma financa bazo la Esperanta aktivado ne povas progresi rapide. Se UEA starigus translimajn entreprenojn (por kio ĝi havas bonajn kondiĉojn pro siaj asocioj en multaj landoj), ĝi povus helpi la agadon per la ĉiujare akirebla grava profito.

3. *UEA klopodu trejni profesiajn laborantojn por Esperanto.*

Por sukcesigi iun idealon, estas necese ke multaj homoj laboru tutkore, tutforte, eĉ profesie por tiu afero. Sed ĝis nun la plejparto de e-istoj uzas E-on aŭ laboras por ĝi en sia libera postlabora tempo.

Se UEA trejnus specialajn laborantojn de Esperanto, kiuj havas fakajn scion, ili povus en diversaj landoj fari fakajn laborojn per Esperanto, kaj unuigi fakulojn por kunlabori pere de la lingvo.

4. *UEA organizu internaciajn kunvenojn kiuj montras Esperanton utila.*

Ĉiujare UEA okazigas Universalan Kongreson, grandan feriadon de e-istoj el la tuta mondo. UK montras la amikecon inter malsampolanoj, sed ĝia

influo estas limigita: malmultaj neesperantistoj ĝin atentis. Se UEA organizus — kun Esperanto kiel laborlingvo — sportkunvenon, artan festivalon aŭ internacian ekspozicion komercan, tiu am la utileco de Esperanto montriĝus. Ne pensu ke ne estas bonajo komerci per Esperanto. Komerco estas la plej ofta agado de ĉiuj homoj. Kaj internacia aktivado subtenata de registaroj, rilatanta al la ĉiutaga vivo, estus bona rimedo por utiligi kaj disvastigi E-on.

5. *La E-movado bezonas reformon.*

Kvankam laŭ esperantistoj nia lingvo akiris grandan sukceson, tamen en la okuloj de ordinarioj Esperanto estas morta lingvo, ĉar ĝi estas tre malproksima de ilia ĉiutaga vivo.

Laŭ Zamenhof "la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolas lian lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin forta kaj fieraj". Sed nun oni diras al ni: "La angla lingvo alportas modernajn teknikojn kaj civilizacion, multaj gejunuloj volonte lernas ĝin por trovi laboron kaj por ĝui modernan vivon. Parolante fremdan lingvon, ili ne plu sentas sin humilaj aŭ ĝenataj, kontraŭe, fieraj, eĉ arogantaj antaŭ siaj samlandanoj."

Nia movado bezonas reformon. Se ĝi ne okazos, Esperanto ne estos multe sukcesinta eĉ kiam ĝiaj adeptoj celebras la ducentjaran jubileon.

Liu Xiaojun (Ĉinio)

En griz-nigra tono

En la tridek jaroj de mia e-isteco al mi ĉiam imponis la bonkoreco de e-istoj. Dum oftaj vojaĝoj mi renkontadis e-istojn kiuj ĉiam prenis akcepti min, doni lokon por noktumado, manĝigi, eĉ finance helpi. Mi ĉiam provis recipi per la samo. Evidentiĝas tamen ke en niajn vicojn venas ankaŭ ne tiom bonkoraj homoj. Eble la nuntempa malfacila situacio influas la neklariĝablajn agojn de certaj esperantistoj. Jen ekzemplo: antaŭ du jaroj samideano el Doneck (Ukrainio) prenis certan sumon de germana esperantisto, kun la celo eldonadi E-periodaĵon en nia lando. Poste . . . nek la promesita laboro estis farita, nek la mono redonita. Eble necesas averti alilandajn e-istojn: ne rapidu tuj pagi al nialandaj e-istoj, se vi ilin ne tre bone konas.

Bedaŭrinde, ankaŭ en okcidentaj landoj renkonteblas similaj kazoj: unu konato mia el Ĥarkovo pli ol jaron ne ricevas ŝuldatan monon el Francio, nur promesojn.

Mi konas okazojn kiam samideanoj el eks-Sovetio opiniis gastadon ĉe e-isto memkompreneblaĵo, kaj restadis kiel en propra hejmo. Sed ankaŭ okcidentanoj ne ĉiam kun komprenemo venas gaste: alilandano restis ĉe konato mia . . . tutan monaton, ne pensante ke decus iom kompensi la manĝadon, se ne la loĝadon. Nuntempe ĉe ni estas sufiĉe peza ŝarĝo akcepti alilandajn gastojn — la prezoj altas, la salajroj male.

Mi bedaŭras ke la tono de tiu ĉi sciigo estas griz-nigra. Certe, mi kun pli granda plezuro skribus pri pozitivaj agoj de esperantistoj, sed necesas averti ankaŭ pri la malo.

Dmitrij Cibulevskij (Ukrainio)

R

Fre
pos

Aktoj d
Div. at
Vieno/I
Inter-K

Centjar
de cen
prelega
leginda
estas la
fare de
kvalitoj
a sci
Mult:
inter es



"La t
Foto